

EKO 2025

Bleko kun eĥo

EKO 2025-10. Marto 4. Pezo: 300 KB. Alkroĉaĵo UN 75 340 KB: Sume 640 KB

UEA aktivas inter poliglotoj

La informa agado por poliglotoj, strategia celgrupo por konsciigo pri Esperanto, fariĝis kerna por UEA. En la lastaj jaroj, kunlabore kun E@I kaj TEJO, UEA garantiis signifan ĉeeston de Esperanto en la eventoj, kiuj fariĝis la plej gravaj poliglotaĵaj eventoj de la mondo. La Plurlingvula Kunveno, organizata de E@I, okazadas en du versioj: rete (kutime en la unua trimestro) kaj surloke (kutime en la dua trimestro). En 2024 la surloka evento okazis en Prago kaj allogis pli ol 700 homojn el sepdeko da landoj. En 2025 UEA denove sponsoras la eventojn, kio donas ne nur videbligon al Esperanto, sed ankaŭ okazojn plurmaniere prezenti niajn lingvon kaj movadon, aldone al ekskluzivaj rabatoj por esperantistoj.

Por la Reta Poliglota Renkontiĝo (*Polyglot Gathering Online*), kiu okazos de la 6-a ĝis la 9-a de marto 2025, la esperantistoj ĝuas 40%-an rabaton por la aliĝkotizo: do € 30 anstataŭ la nunaj € 50 EUR. Por tio sufiĉas entajpi la rabatkodon "ueamojosas" en la [aliĝilo al Polyglot Gathering Online](https://polyglotgathering.com/2025/eo/online/registration) (polyglotgathering.com/2025/eo/online/registration).

Pri la Reta Poliglota Renkontiĝo la sponsorado de UEA ebligas la aperigon de la nomo de UEA kaj Esperanto en ĉiuj video-registraĵoj de la evento, kiuj normale spekteblas iom post la evento mem en la jutub-kanalo [PolyglotGathering](https://youtube.com/polyglotgathering) (youtube.com/polyglotgathering);

Fonto: Gazetara Komunikado de UEA.



Dua Bulteno de Brno

En la retejo de UEA aperis la Dua Bulteno de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto. Elŝuta invito disiris al la aliĝintoj. Legu pli ĉe <https://sezonoj.ru/2025/02/brno-12/>

Senkosta urba trafiko por BET-59

La urbo Kaŭno konsentis provizi *senpagan* veturadon per la urbaj busoj kaj trolebusoj por la partoprenantoj de BET-59. Legu pli en *La Ondo de Esperanto* <https://sezonoj.ru/2025/01/bet-168/>.



Gediminas Degėsys, litova filozofa, poligloto, fakulo pri Afriko, poeto kaj esperantisto, en la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Kaŭno prezentos sian prelegon pri la sub-sahara Afriko. Konatiĝu kun li en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* ĉe <https://sezonoj.ru/2025/01/bet-169/>

EKO gratulas la elektitojn al la Komitato de UEA

La novaj komitatanoj B de UEA estas **José Antonio del Barrio** el Hispanio, **Marija Belošević** el Kroatio, **François Lo Jacomo** el Francio, **Wu Guojiang** el Ĉinio kaj **Espoir Kasati** el Kongo DR. La nove elektitaj komitatanoj B oficos ekde la malfermo de la ordinara kunveno de la Komitato en Brno.

SMG: La A-komitatanoj estas nomumataj de la aliĝintaj Landaj kaj Fakaj Asocioj. La C-komitatanoj estas nomumitaj de la A- kaj B-komitatanoj. Mi dum pluraj jaroj estis B-komitatano kaj poste, ĝis nun, C-komitatano.

Tago de la Gepatra Lingvo raportita en Ĉinio

El Popola Ĉinio raportas al la ĉina publiko la mesaĝon de UEA en la Internacia Tago de la Gepatra lingvo en la ĉina lingvo kaj Esperanto, jen:

<https://mp.weixin.qq.com/s/3mpl2DhW46NoIlg155-vZWQ> .

Chen Ji, Ĝenerala Sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo

Indonezio rolas tutmonde per la junulara kongreso

TEJO, kunlabore kun UEA, lanĉis donackampanjon por ebligi la amasan partoprenon de junaj esperantistoj el Azio kaj Oceanio en la 81-a Internacia Junulara Kongreso (IJK), kiu okazos en Indonezio de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto. Ni petas vian plej vastan kaj malavaran subtenon al nia iniciato.

La IJK en Indonezio estas la unua IJK en Sudorienta Azio depost 13 jaroj kaj la unua ekster Eŭropo post 8 jaroj. Ekde la IJK 2012 en Vjetnamio, multaj junuloj intertempe ekaktivis en Filipinoj, Indonezio, Orienta Timoro, Nepalo ktp. (Mi mem estas unu el tiuj junuloj.) Ni celas sendi ilin al la IJK, kie ili povos konatiĝi kun aktivuloj el aliaj mondopartoj kaj ĉeesti seminariojn kaj aliajn edukajn kaj kapabligajn aktivaĵojn. Espereble, kun tiuj spertoj, niaj junuloj revenos al siaj landoj kiel celkonsciaj, spertaj kaj inspiritaj aktivuloj kiuj daŭrigos la disvastigon de Esperanto en loka nivelo kaj iam eĉ iĝos la estontaj gvidantoj de TEJO kaj UEA.

Multaj junuloj ne disponas pri financaj rimedoj por vojaĝi al la IJK. En la lastaj IJK-oj, azianoj kaj oceanianoj estas inter la malplej reprezentataj grupoj: en IJK 2023 (Italio) partoprenis 7 homoj, dum en IJK 2024 (Litovio) partoprenis nur tri homoj. En ambaŭ kazoj, plejparto de ĉeestintoj povis veni dank' al la subteno de TEJO.

En 2025, ni esperas ŝanĝi la situacion: ĉi-jare, azianoj kaj oceanianoj estos la steluloj de nia kongreso. TEJO utiligos sian fonduson *Partoprenu IJK-n*, sed ĝia bonhavo estas limigita. Tial ni alvokas al via bonkora subteno kaj esperas, ke vi donacos al la fonduso.

UEA estas partnero: por ĉiu eŭro donacita, UEA donacos unu eŭron, ĝis € 2 000. Ni celas atingi minimume € 8.000, kiuj devos sufiĉi por 20 junuloj el diversaj mondopartoj. Ni esperas ke vi opinios, ke partoprenigi junulojn en la IJK estos bona, farinda investo. Partoprenigi pli da junuloj signifas pligrandigi la kongreson, kiu havos bonan efikon ĉe lokaj kaj landaj instancoj kaj komunikiloj, kiuj scios pri la kongreso.

Por scii pli, iru al la paĝo de la kampanjo: mallonge.net/subtenu-ijk2025. Sur tiu paĝo ni afiŝados pri ĝia progreso. Donacoj faritaj per *GoGetFunding* la platformo forprenas 4%

pro administraj kostoj, tial ni konsilas donaci ekster ĝi per diversaj pagmetodoj ĉe ijk2025.tejo.org/pagmetodoj/.

Albert Stalin Garrido

Por donaci per via UEA-konto, ĝiru al la konto "ijkb-b" kun la priskribo: *Donaco PPIJK + Via Nomo/Anonima Donaco*. Eblas ankaŭ per via bankkarto [en ĉi tiu paĝo](#). Homoj kiuj donacos almenaŭ €5 aperos en [nia listo de subtenantoj](#), krom se ili petas esti anonimaj.

Greziljono kaj la tegmentaj turmentoj

La projekto ripari ĉiujn tegmentojn de la kastelo kaj ĝiajn kromdomojn, estas preskaŭ finita: la konstrulaboro rekomenciĝis en decembro, kun dujara malfruo (pro manko de laborforto ĉe la tegmentisto). Restas triono de la tegmento de la kastelo por anstataŭigi kaj 15% de la tuta kosto por pagi, sed repago de la prunto lanĉita en 2021 komenciĝis fine de 2024. La Jarkunsido, per 70% de balotintoj, voĉdonis favore al intensigo de komerca agado kaj serĉado de klientoj ekster semajnfinoj. Pierre Soubourou estis elektita Prezidanto kaj la Komitato aprobis, por pli bone adapti nian strukturon al niaj komercaj celoj, profesion ekspertizadon, kies unua fazo komenciĝis. La Kastelo de Grésillon restas antaŭ ĉio la Kulturdomo de Esperanto, kie vi povos ĝui, lerni kaj praktiki Esperanton. Profitu, ekzemple, la [Francan Esperanto-Kongreson](#) en Nantes (7-9 junio) por aliĝi al la postkongreso en Greziljono (9-13 junio) kaj viziti apudajn famajn kastelojn. Venu kaj ĝuu niajn [multajn agadojn](#) gvidatajn de instruistoj el diversaj landoj sed parolantaj nian komunan lingvon. Jen la lasta filmeto: <https://youtu.be/8NKkjui7sn4>



La nova retejo de Esperanto Nederland

La slogano tekstas: 'Esperanto por translimo'. Al tiu landeto ne mankas landlimoj. Temas ne nur pri la tujaj Belgio kaj Germanio. Nederlandanoj amase flugas al Hispanio kaj la suda Francio, por ĝui klimaton pli agrablan kaj kulturon pli ekzotikan.

Balkana kunveno omaĝas al Renato

Aurora Bute parolis pri Renato Corsetti, kiel senlaca batalanto por Eo-informado, por la promocio de Esperanto en la tuta mondo, Renato kiel mentoro, inspirfonto kaj vera gvidanto. Renato iniciatis la diskutgrupon *Balkanaj kunlaborantoj*, kies kunsidojn li mem gvidis ĉiumonate. Memore al Renato ni

daŭrigos lian iniciaton, do la kunsidojn de la *Balkanaj kunlaborantoj*.

Gradimir Kragić rememoris pri Renato kiel partopreninto de la IJK en Sarajevo 1973. Laŭ lia iniciato UEA fondis la servon *Espero* per kiu UEA subtenis Esperantistojn en landoj kie okazas militoj.

Mariana Pitar parolis pri la afabla preteco de Renato verki tekston por la kovrilo de Aktoj de E-Scienca Kolokvo en Rumanio, spite al la fakto, ke ili ne konis unu la alian.

Radojica Petrović: unuafoje renkontis Renaton dum UK en Zagrebo 2001. Radojica substrekis bonan kunlaboron kun Renato.

Szabolcs István vojaĝos kaj parolos dum la funebra ceremonio en Londono la 3-an de marto 2025.

Bardhyl Selimi, Birta Petronela, Danijela Petrović, Doina Popa, Dolca Ionela Adriana, Dragana Dučić, Gezim Rexha, Gradimir Kragić, Juri Andoni, Mariana Pitar, Radojica Petrović, Raia Androvska, Szabolcs István.

UN-bulteno Numero 75 – marto – aprilo 2025

- Esperanto-parolantoj tra la mondo festis la Tagon de la Gepatra Lingvo.
 - Tutmonda festado de la Zamenhofa Tago.
 - Komitato pri Lingvoj traktis indiĝenajn lingvojn.
 - Inaŭguran Premion Grégoire Maertens ricevis Stela Besenyei-Merger.
 - UEA funebras la forpason de amata aktivulo kaj iama prezidanto.
- La bulteno estas alkröcita.

Jen interesaj artikoloj en la retejo <uea.facila>:

<https://uea.facila.org/artikoloj/opinioj/esperanto-kiel-ponto-inter-kulturoj-r458/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/homoj/mortis-hungara-verkisto-istv%C3%A1n-nemere-r459/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/%C4%9Denerale/esperanto-kaj-la-movado-de-nova-kulturo-en-%C4%89inio-r460/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/opinioj/referendumo-%C4%89u-demokratia-ilo-r464/>

Kongresa progreso

Je la 1-a de marto 2025 jam 778 personoj el 56 landoj aliĝis al la 110-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos ĉi-somere en Brno; plej multaj aliĝintoj estas el Ĉeĥio kaj Germanio (po 87), Pollando (74) kaj Francio (66). Legu pli detalan statistikon kaj komparon kun la laste okazinta UK en Eŭropo (UK-108 en Torino, 2023) en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* ĉe <https://sezonoj.ru/2025/03/brno-13/>
Se vi ankoraŭ ne aliĝis, pensu pri aliĝo laŭ la dua aliĝtarifo kiu validas ĝis la 31-a de marto.

===== vortoj: 1410 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komuniko iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikadoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

La kvardek kvar numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikadojn pere de retlisto.